

Gazeto Andalusia



ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

N-ro 27 ★ 8-a Jarkolekto ★ JANUARO - JUNIO 1991



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSE GARZON RUIZ en San Fernando (Cádiz) 1910.
 Organo Oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO. REDACCION: C/ SOL 75 41003 SEVILLA
DIRECCION POSTAL: Apartado 611. 14080 CORDOBA. DEPOSITO LEGAL: MA-1136/86
IMPRIME: Flandra Esperanto-Ligo ANTWERPEN (Bélgica) y COPYUR C. del Rosario 14
SEVILLA. DIRECTOR: José María RODRIGUEZ HERNANDEZ.

DIRECCIONES DE INTERES

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado 864. 29080 MALAGA

Grupo de Esperanto de MALAGA
Apartado de Correos 3275
29080 MALAGA

Asociación SEVILLANA de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación CORDOBESA de Esperanto
Apartado 611 14080 CORDOBA

Grupo Esperantista de JEREZ
Apartado 320 JEREZ (Cádiz)

Grupo Esperantista de TORROX
Apartado 13 TORROX (Málaga)

Grupo Baha'i de Amistad Esperantista
Apartado de Correos 496
11200 ALGECIRAS (Cádiz)

Asociación Sevillana de Jóvenes
Esperantistas
C/ Sol 75
41003 SEVILLA

Sección Andaluza de Jóvenes
Esperantistas
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Curso de Esperanto por Correspondencia
Apartado de Correos 864
29080 MALAGA

ENHAVO

PA40

★	TOMAS CASPE CEREIJO	
★	<i>In Memoriam</i>	1
★	INFOMOJ	2
★	DENOVE PRI LA PRESADO	
★	DE E-LITEROJ PER KOM-	
★	PUTILOJ	3
★	MEDITADO	6
★	LA MALKOLONIIGO DE OK--	
★	CIDENTA SAHARO	8
★	ANDALUZIA POEZIO	11
★	E=MC2 * SCIENCA PAGO ..	12
★	HUMORO	13
★	NOVELO	14
★	LUDU KUN NI	16

★ SUR LA KONTRAŬKOVRILO: Paĝo
★ 5-a de la Esperant-lingva at
★ laso de Andaluzio dediĉata
★ al la vilaĝoj de la Provinco
★ Kadizo.

DEPOSITO LEGAL MA-1.136/86

TOMAS CASPE CEREIJO, In Memoriam
 =====

Antaŭ kelkaj monatoj mortis en Seviljo TOMAS CASPE CEREIJO, pli konata en la Esperanto-Movado kiel ANTOLIN. Tomás aŭdis unuafoje la vorton Esperanto en Madrido meze de la 20a jardeko. Tie en la socialista sidejo okazis prelego de estrarano de la tiamaj Hispana Esperanto Asocio kaj la internacia lingvo baldaŭ kaptis lian atenton ne nur kiel ponto inter la diversnaciaĵoj sed ĉefe kiel ligilo inter la laborantoj de la tuta mondo, li apogis dum sia tuta vivo la liberigon de la labor-klaso, unue ĉe la PSOE kaj poste ĉe la PASOC.

Dum la civila milito li prenis la armilojn por defendi la Respublikon, kaj en ĝia armeo li atingis la kapitan-rangon. Venkita sia bataliono en Albacete en la lastaj tagoj de la milito, li havis la ŝancon ekziliĝi, tamen li preferis resti en sia patrujo. La nova reĝimo malliberigis lin kaj eĉ mort-kondamnis, kuris en nia lando la 40a jardeko. Kiel iaspeca nova Montekrista Grafo Tomás sukcesis fuĝi el la malliberejo akirante novan identecon: Antolín Colmenar. Tiel li forkuris al pli trankvila urbo Seviljo kie li eklaboris kiel tegiston. Ĉi tie li kontaktis kun la malmulta esperantistaro, Rafael FIOL kaj Karolo MARTINEZ, kaj kunaj fondis en la 70a jardeko la Sevilja Esperanto-Akademio ĉe la antikva teg-vendejo de Tomás. Li tiel komencis instrui Esperanton al aro da novaj interesitoj. Laŭ siaj propraj vortoj li neniam instruis la lingvon, li nur agis instigante la propran memlernadon. Ekde tiuj jaroj la Akademio, ĉe tipa sevilja strato en la Makarena kvartalo, estis grava disvastigejo de la E-lingvo kaj la granda verda stelo kiu ornamis la fasadon utilis kiel internacieca kaj kultura lumturo por ĉiuj seviljanoj pretaj lerni antaŭe malpermesita lingvon.

Jam en la 80a jardeko Tomás, denove sub sia vera nomo kiam la demokratio forpelis la danĝeron, daŭris la strebojn, ĉi-foje vizitante konstante la Urbodomon, Provincan Deputistaron, Ekspo '92-n, kaj ĉiujn aliajn instancojn prezentante Esperanton kaj petante apogojn. Ti el la sevilja esperantistaro atingis organizi sukcese la Hispanan Kongreson de Esperanto en 1984 kaj la Andaluzian Kongreson en 1985. En la jaro 1990 Tomás organizis novan kurson ĉe la Akademio, post la unua klaso bedaŭrinda kaj malbenata akcidento kaŭzis al li gravajn vundojn, la orgojlo kaj fiereco de ĉi samideano estis pli grandaj ol la propra konstato de sia jam preskaŭ okdekjaraĝa forto. Dum unu jaro Tomás luktis kontraŭ la vundoj kaj kontraŭ aliaj malsanoj kiuj kaŭzis al li fine la morton.

Tomás Caspe Cereijo
Batalanto por la
Paco.

TOMAS CASPE forpasis, li lasis sola ne nur al Anita, sia vivdino kaj al siaj filinoj, sed ankaŭ iomete al la tuta Sevilja Esperanto-Movado. Kiel admonas esperant-lingve sia tombo "Jen Batalanto por la Paco". Ni sekvu sian ekzemplon.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

I N F O R M O J

=====

★ Erare ni aperigis en la pasinta numero de nia revuo la estraro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo nomumita en Torokso en Oktobro '90. Jen la nova korekta estraro:

- Prezidanto: ANDRES MARTIN GONZALEZ
- Vic-Prezidanto: TOMAS OLIVER CARAVANTES
- Generala Sekretario: JOSE FRANCISCO MARTIN DEL POZO
- Kasisto: VICENTE RAMIREZ PARRAGA

Ĉi estraro agados ĝis Oktobro '92.

★ Ni dankas al HEROLDO DE ESPERANTO pro la publikigo en siaj paĝoj de artikolo originale eldonita en GAZETO ANDALUZIA. Temas pri "Esperanto en la Universalaj Ekspozicioj", Gazeto Andaluzia n-ro 25 kaj Heroldo de Esperanto n-ro 16 (1835) paĝo 3a 18-Dec-90. Kvankam ni agnoskas ke nia revuo ankoraŭ devas plibonigi multe sian enhavon ni dankas la publikigon de nia artikolo en internacia meritoplena gazeto.

★ En Septembro de 1990 okazis en Kordovo semajno de konferencoj pri FRANCISCO AZORIN IZQUIERDO, li estis kordova arkitekto, socialista parlamentano kaj elstara esperantisto dum la jaroj 20a-30a. Bedaŭrinde dum tiu semajno povis okazis neniu konferenco pri Francisco Azorin kaj Esperanto. Tamen la organizantoj de la prelegoj kontaktis kun esperantisto de Kordovo por publikigi kune kun aliaj konferencoj eseon pri Esperanto. La verkaĵo, jam redaktita, aperos sub la titolo "Francisco Azorin Izquierdo: una biografía esperantista". La libro estos eldonata de la Kordova Urbodomo kaj la Kolegio de Arkitektoj kaj aperos fine de 1991

★ CU VI ANKORAŬ NE PAGIS VIAN KOTIZON DE 1991 AL AEU ?

Se jes, multajn dankojn. Se ne, bv. sendi ĝin kiel eble plej rapide al:

- * Per poŝtmandato ĉ Asoc. Andaluza de Esperanto, Apartado 864, 29080 MALAGA
- * Pagante rekte al la konto de la Caja Postal de Ahorros: 00.13.837.197
- * Se vi loĝas en Malago, Seviljo, Kordovo, Jerezo aŭ Torokso rekte en via loka grupo.

Atentu, se vi ne pagas la kotizon de la jaro '91 ĉi tiu estos la lasta numero de GAZETO ANDALUZIA kiun ni sendos al vi. Atención, si aún no ha satisfecho la cuota del año '91 le recordamos que éste será el último número de GAZETO ANDALUZIA que le enviaremos.


JARA KOTIZO / CUOTA ANUAL : 1.200 Ptoj.

DENOVE PRI LA PRESADO DE LA ESPERANTOLITEROJ PER KOMPUTILOJ

Jam en la 20a numero de *GAZETO ANDALUZIA* aperis artikoleto de mi verkita pri ĉi-tiu temo, kie mi parolis pri la eblecoj uzi WORDSTAR, CHIWITE kaj LETRIX en PC-kongruaj komputiloj; mi revenas tien kun pli granda sperto kaj kelkaj novaj trovaĵoj.

Pensu: kion nepre bezonas vi kaj via komputilo, se vi deziras skribi Esperantlingve?

- 1e. Ke la E-signoj estu facile uzeblaj.
- 2e. Ke ili videblu surekrane.
- 3e. Ke ili estu facile preseblaj.




La problemo estas, ke la signaro de la komputiloj estas, baze, tiu nomita ASCII (*American Standard of Computer Information Interchange*, aŭ Usona Normo por Komputila Informinterŝanĝado), bazita ne sur la latina aboco, sed sur tiu, kiun usonanoj uzas (tiel, ke eĉ per kelkaj programoj oni malfacile uzas la hispanlingvajn ñ, ¿ kaj la akcentojn, se ne paroli pri aliaj abocoj, kiel la greka, ktp. Tamen, kiam temas pri tekstoprilaboraj programoj, ekzistas multaj solvoj (sed ne kiam temas pri alitipaj programoj).

Ni parolu pli pri LETRIX. En la antaŭa artikolo, mi jam klari-

gis ke ĝi estas programo kiu plibonigas la kvaliton de la presado, speciale per 9-pinglaĵpresiloj, kaj ankaŭ pri la ebleco desegni la lintertipojn. Sed ne oni tion preferas, oni eĉ ne devas designi ilin. Oni povas uzi ĝin rekte, premante la literon (ekzemple, la c) kaj du cirkumfleksajn akcentojn. Problemoj: oni ankoraŭ vidas strangaĵojn surekrane (kiel strangaĵo anstataŭ strangaĵo); kaj la spaco intervorta, kiam oni presas la tekston, pligrandiĝas, ĉar kvankam oni skribis, perekzemple, 60 karakterojn, aperos malpli ol 60 (pro tio ke ĉ estastri, sed nur aperos unu, ĉ). Tamen, estas la nura solvo de mi konata kiam temas pri uzo de programoj kiel dBase aŭ BASIC.

Tiu solvo estas, kompreneble, nur parte, ĉar ĝi ne ebligas, pere de donitaĵbazoj, la uzantojn ordigi vortojn esperantlingvajn (la kialo estas klara: la komputilo ordigos ĉ, t.e., ĉ, kiel "c" plus signoj, post "cz", ne kiel ĉ, ktp; ĉi tio validas ankaŭ se oni desegnas la literojn). Nur se oni ne devas ordigi esperantajn vortojn tio estas iom utila solvo.

Alia problemo: LETRIX estas memorloĝanta programo, t.e. programo kiu restas en la komputilo.



memoro dum alia programo funkcias. Tial, ĝi povas nekongrui kun aliaj (ekzemple, kun ChiWrite aŭ MLS) kaj ĝi certe malpliigas la memoron uzeblan (ĝi uzas minimume 50K, en versio 3.4)


Interkrampe, laŭ la Katalogo de UEA, *Esperanto Press* vendas la instrukciojn de ĉi tiu programo esperantlingve (kontraŭ 5 dolaroj). Vi povas skribi al *Esperanto Press* R.R.1, Bailieboro, Ontario KOL 1B0 KANADO.

Alia tekstkoprilaborilo ebligas la uzadon de preskaŭ ĉiaj literoj: temas pri MLS (aŭ anglalingve, *Multilingual Scholar*, Multlingva Klerulo). Ĝi taŭgas por tiuj, kiuj bezonas malfacilajn literojn kaj abocojn. Alia avantaĝo: oni povas skribi per la latina, greka, rusa, araba kaj hebrea abocoj (per la du lastaj, skribeblaj dekstremaldekstren!), eĉ samlinie, kaj oni povas uzi akcentojn sur konsonantoj, aŭ sur majusklaĵ vokaloj.

Tamen, ĝi ankaŭ havas malfacilaĵojn. Ekzemple, oni premas la akcentojn post la dezirata vokalo aŭ konsonanto, malsame kaj kutime, kaj la akcentoj situas en la funkcioklavoj (tiel, F1=^, F2=`, F5=^, F6=^). Do, por skribi ĉ, oni devas unue premi "c", poste F5; por skribi "Ĉ", unue premi "C", poste "F5"+SHIFT (la avantaĝo estas, ke eĉ la ĉefliteroj tre bone aspek-



tas, kaj oni povas uzi ĉiajn akcentojn: á, â, ã, ä, å, Æ, Æ, Æ). La helpo, anglalingve. La preskontroloj estas kompleksaj (oni devas skribi, ekzemple, kombinojn kiel [ALT+F6]+[fn]+[1,4]+[ALT+F6] por uzi la kursivon) kaj kelkaj trajtoj ne estas rapidaj (kiel serĉado kaj anstataŭigo). Eĉ la mezurunuoj estas malfacilaj: anstataŭ per centimetroj aŭ milimetroj, oni kontrolas ĝin per coldekonoj.



Plie, la instalado estas kompleksa (oni devas instrui la komputilon pri la subadresaro kie la programo restos, la diskilo, kiom da abocoj uni uzos, kian presilon oni havas, kiom da litertipoj oni uzos...)

Eĉ per la pli malmultekostaj 9pinglaĵ presiloj ĝi permesas kaj malaltkvalitan literon kaj altkvalitan (kvankam tiu-ĉi malrapide preseblas); pri laasertipaj, mi ne konstatis, sed oni povas uzi kaj HP-tipajn kaj JLasertipajn.

Per la plej konataj el la PCaj tekstoprilaboriloj, WORDPERFECT 5.1, la skribado estas facila: oni nur devas premi samtempe la klavojn [CTRL] kaj V; mesaĝo aperos, petante du klavojn; ekzistas kombinoj kiuj aperigos la esperantajn librojn. Jen la kombinoj:

1 100: Ĉ; 1 101: ĉ; 1 122: Ğ

1 123: g; 1 126: h; 1 127: h;
1 140: j; 1 141: j; 1 180: s;
1 181: s; 1 188: ü; 1 189: ü;

Tamen, la preskvalito, almenaŭ per 9 pingalj presiloj, ne estas tre bona. Alia malavantaĝo estas, ke tia kombino aperas surekrane nur kiel konsonanto neĉapelita, kaj nur kiam oni antaŭvidas la presrezulton videblas la kombino "ĉ". Do, kvankam ĉi tiu programo estas superba, kaj eĉ permesas enmeti (kaj manipuli) bildojn en la tekston, per ĝi ne estas facile skribi Esperantilingve.

Cetere, la plej bona solvo, estas, ke la programeldonistoj havigu, kune kun la operacia sistemo, multajn ASCII-versiojn. Sajne, tio jam okazas por la MS-DOS, versio 4.0, sed neniu el tiuj versioj enhavas la Esperantajn literojn.

En Esperantujo ekzistas fakaj
asocioj kiuj laboras pri kompu-
tado:

★ TAKIS (Tutmonda Asocio pri Ki-
bernetiko, Informatiko kaj
Sistematiko), p/a Milan Zvara
Popradské nábr., 33 CS-058 01
POPRAD. ĈEĤOSLOVAKIO.

★ KompRo (Komputila Rondo) p/a
S-ro Jürgen WULFF, Bomkamp 12
W-2000 HAMBURG 70, GERMANY.

Nek en ĉi-tiu artikolo ne en la aperigita antaŭe en nia revuo oni pritraktis la alian plikonatan komputilon, la Apple Macintosh. Se iu el niaj legantoj povas iom klarigi tian aferon, bonvolu kontakti la Asocion ĉe nia poŝtkesto.

José Francisco MARTIN DEL POZO

Noto de la Direktoro: La originalaĵo de ĉi tiu artikolo estis skribata de sia aŭtoro mem pere de PC-kongrua komputilo. Por la tajpado ĉe la revuo oni uzis, kiel por ĉiuj artikoloj, tekstoprilaborilon speciale preparita por skribi en Esperanto ĉe la komputilo AMSTRAD PCW 8256. Do, ne niu el la sistemoj pristuditaj en la artikolo estis uzata por skribi ĝin poste en la revuo.

MUZIKO EN ESPERANTO PRODUKTITA EN ANDALUZIO!

Ĉu vere? Jes, SOLO, malaga kantisto, produktis sub la aŭspico de AEU sian unuan diskon kun kanzonoj en Esperanto. Laŭ komentarioj la kvalito de la kanzonoj estas sendube tutĝoja novaĵo en la panoramo de la muziko en la internacia lingvo. Do, KION VI ATENDAS?

★ Aŭskultu ĉe vi la belajn kanzonojn de SOLO en esperanto.

Longdaŭra disko: KOSMA INFANO. Prezo: 1.000 Ptoj + sendokostoj.
Mendebla ĉe: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Poŝtkesto 864. 29080 MALAGA

REGALU VIAN AÜD-SENTON!

MEDITADO

Konvenas, de tempo al tempo, rigardi malantaŭen por konscii pri la realo de nia ĉiŭtaga laboro kaj la rezultatojn de nia penado. Almenaŭ, se ni agadas tiel, eblas eviti fiaskojn kaj enkonduki niajn fortojn al pli taŭgaj celoj. Mi ne celas ĝeni iun, sed, kompreneble ankaŭ ne flati. Mi nur deziras atentigi la legantojn pri la jeno:

- Por ke la akceptado de Esperanto far de nia socio, necesas ke la esperantistoj unuiĝu. Ne agadas dece tiuj personoj emfazantaj la gravecon de Esperanto antaŭ la ekstermovadanoj se samtempe malatentas tute la alvokojn de la Esperanto-organizaĵoj. Ankaŭ ne agadas taŭge kiuj malatentas la proponojn de samideanoj dezirantaj kunlabori sincere. Tre ofte okazas tio, bedaŭrinde, senvolonte sed tre efike.

- Blinde, multaj el ni klopodas pri la enkonduko de Esperanto en la oficialajn lernejojn kaj naive atendas, ke tiel la antaŭeniĝo de la Internacia Lingvo en nian landon realiĝos tutcerte. Krome, ili atendas kaj esperas, ke la koncerna penado estos plenumata de la aliaj, ĉar ili ŝatas sin nekapablaj. Kompreneble, la rezultatoj estas tute malkontentigaj, ĉar ili mem neniel helpas. Ili pretas nur kritiki la aliajn kaj senkuraĝiĝi.

- Nia socio, tre pragmatisma, neniam akceptos Esperanton vaste, se ne estas entreprenoj uzantaj la Internacian Lingvon. Tial urĝas,

ke esperantistoj mem uzu la lingvon en siaj propraj entreprenoj kaj ke la Esperanto-organizaĵoj (AEU, inter ili) estigu ekonomian agadon havigantan al ĝi kaj al la socio enspezojn. Plie, agante tiamaniere, tiuj organizaĵoj dependus pli de siaj propraj enspezoj ol de subvencioj kaj abonkotizoj malabundaj.

- Esperantistoj povas gajni monon tradukante por aliaj entreprenoj kaj por tiuj apartenantaj al la Movado. Tio estas tute ebla kaj reala en pli kaj pli okazoj. Hodiaŭ, en Hispanio, ne estas malfacilaĵoj flanke de la Registaro, se iu esperantisto decidas traduki al Esperanto aŭ en ĝin. Ne estas speciala Asocio de Tradukistoj kiu havas ekskluzivan rajton traduki. Ĉiu rajtas traduki kaj vendi la rezultaton de sia laboro.

- Pli kaj pli, la eksterlandanoj komprenas ke viziti iun landon kaj ne komunikiĝi rekte kun la loĝantoj de la vizitata lando estas sensencaĵo. Tiaj turistoj enuiĝas, ĉar jam ne allogas ilin la monumentoj aŭ la pejzaĝoj. Ili deziras koni la realan vivon de la lando. Evidentas, do la grava rolo de Esperanto en tiu kvalita turismo. Jam aperas proponoj de samideanoj en kaj eksterlandaj kiuj, fronte al la palemo de aliaj, pretas agadi serioze kaj efike en ĉi tiu tereno. Estus bedaŭrinde, se AEU ne partoprenus grave en la realigado de tiu turismo.

- Nepras fortaj Esperantoj-organizoj. Tamen, nepras distingi klare inter multaj organizoj kaj iuj- malmultaj fortaj organizoj. Estas samideanoj opiniantaj ke utilas estigi oficiale multajn grupojn kaj malatentigi la regionajn kaj/aŭ ŝtatajn asociojn. Rezultatoj? Neniu grava sukceso, ĉar ĉiuj malfortas. Necesas ali-

ĝi al landaj kaj regionaj asocioj, samkiel al la fakaj por atingi gravan reprezentantecon antaŭ la socio. Tio, kaj la oftaj kontaktoj inter ĉiuj, loke kaj perkoresponde, ebligas pli grandigi nian kapablon por atingi laŭŝtupo niajn celojn.

ANDRÉS MARTÍN GONZÁLEZ

La venontan 12an/13an de Oktobro okazos en Torokso (Malago) la 9-a ESPERANTO-LABORTAGJOJ, tio estas la Ĝenerala Asembleo de la andaluzia esperantistaro. Estas necese ke ni ĉiuj alportu niajn spertojn en la disvastigo de la internacia lingvo, kaj ke ni proponu aferojn, debatojn kaj kiun ajn interesan punkton rilate Esperanton en Andaluzio.

Se vi povas ĉeesti ne hezitu, Torokso, sia trankvileco, la mildeco de siaj plaĝoj kaj la beleco de la malaga Akserkio invitas vin.

Ĉeestu kaj partoprenu, ESPERANTO tion meritas.

★ Pliajn informojn pri vojaĝo kaj restado: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Poŝtkesto 13 TORROX (Málaga)
Poŝtkesto 864 29080 MALAGA

Los próximos días 12/13 de Octubre tendrán lugar en Torrox (Málaga) las 9ª Jornadas de Trabajo Esperantistas de Andalucía, entendidas como la Asamblea General de los esperantistas andaluces. Es necesario que todos aportemos nuestras experiencias en la difusión de la lengua internacional, y que propongamos cuestiones, debates y cualquier idea interesante relacionada con el Esperanto en Andalucía.

Si tienes la oportunidad de asistir no lo dudes, Torrox, su tranquilidad, la calma de sus playas y la belleza de la Ajarquía malagueña te invitan.

Ven y participa, el ESPERANTO se lo merece.

★ Más información sobre viaje y estancia: Asociación Andaluza de Esperanto. Apartado de Correos 13 TORROX (Málaga).
Apartado de Correos 864 29080 MALAGA.


ekzistis nenia suvereneca ligo inter Saharo kaj Maroko kaj Maŭritano, proponante ke oni devas apliki la principon pri memstareco en la malkoloniigo laŭ la libera volonteco de la anoj de la teritorio. Kvankam oni akceptis ke kelkaj nordaj triboj historie estis ligitaj al la maroka sultano kaj same en la sudo kelkaj nomadoj apartenis al la maŭritanaj triboj de la regiono Ĉingetjo.

Tiu sama tago la 16an de Septembro, nur kelkaj horoj poste, la maroka reĝo Hassan la dua elstaris antaŭ siaj civitanoj ke la Tribunalo, supozite, akceptis la marokajn pretendojn kaj anoncis ke oni organizus pacan marŝadon kun 350.000 personoj, armitaj nur per la Nobla Korano, por okupi Saharon. Komenciĝis la Verda Marŝado. Kompreneble ĉi ĝenerala mobilizado ne estis improvizita, ŝajnas ke estis projektata de entrepreno de internaciaj studoj de Londono finance apogita de Saŭdarabio, same ĝi estis apogita de Usono kaj ĉefe de Henry Kissinger.

En Hispanio la afero ankaŭ ŝanĝis, la unua celo de nia lando estis krei ŝtaton sub la protekto de Hispanio, regata de la fantoma PUNS, sed pro la ne-okazigo de la referendumo kaj same pro la fakto ke la estraro de la PUNS forfuĝis al Maroko, la hispana registaro kaj la Armea Stabaro komprenis ke sendependa Saharo sub la *Frente Polisario*, sub la influo de Alĝerio kaj Libio, estus granda danĝero por la Kanaria Insularo kaj por la okcidenta defend-sistemo de la norda Atlantiko. Tiel pensis ankaŭ Usono kaj Francio, kiuj preferis marokan Saharon antaŭ ol sub la influo de Libio kaj Alĝe-

rio. La decido liveri Saharon al Maroko oni prenis dum la Ministr-Konsilo de la 17a de Oktobro de 1975. Oni decidis cedi la teritorion sed kondiĉe ke ĉi decido ne estis konocota de la publika opinio, de la hispana armeo nek de la saharaj naciistoj. La 30an de Oktobro kun la verda marŝado ankoraŭ en Maroko Hispanio permesis la eniron de la maroka armeo en la nordon de Saharo, kie okazis la unuaj bataloj inter la *Frente Polisario* kaj Maroko, kaj same ordonis al la hispana armeo forlasi kelkajn landlimajn konstruaĵojn en la sudo.

Hispanio ludis strangan rolon, antaŭ la publiko oni protestis ĉe NU kaj oni organizis defend-sistemon en la landlimo inter Maroko kaj Saharo, same dum la krizo la Princo Juan Carlos,



provizora ŝtatestro pro la malsano de la ĝeneralo Franco vizitis la soldatojn en El Aaiun, ankaŭ oni sendis la tutajn hispanajn milit-ŝipojn al la Kanariaj Insuloj. Tamen kontraŭe jam estis decidita la liveron de Saharo al Maroko kaj la evakuon de la hispanoj, ŝtatoĉefistoj kaj soldatoj pere de la Operacio "Hirundo". La 8an de Novembro du hispanaj ministroj renkontiĝas kun la reĝo Hassan kaj lin informas ke Hispanio estas preta liveri Saharon. La 10an 500.000 marokoj, haltigitaj antaŭ la min-zono de la land-limo defendata de la armeo retiriĝis.

La 14an de Novembro oni subskribis la Traktaton de Madrido, laŭ ĉi akordo Hispanio cedis la administradon de du trionoj de Saharo al Maroko kaj la ceteran parton al Maŭritano. La kontraŭkon--diĉoj oferitaj de Maroko, pagoj al hispanoj pro la perdoj, fiŝkaptadaj permesoj, ktp, neniam oni plenumis. La 20an de Novembro mortis la ĝeneralo Franco, la nova reĝimo ne deziris internaciajn problemojn, precipe pro la fakto ke en Hispanio jam estis multaj internaj problemoj kiuj sendube pliiĝus kun la politikaj ŝanĝoj.

La cetera parto de la historio jam estas diskonata, la 28an de Februaro de 1976 Hispanio retiriĝis definitive de Saharo, okupita de Maroko kaj Maŭritano; samtempe naskiĝis la Sahara Araba Demokratia Respubliko, regita de la *Frente Polisario* kiu luktis kontraŭ la invadantoj. Maroko dediĉas ekde tiam grandan parton de sia buĝeto al la milito, sed ankoraŭ ne venkis al la saharaj geriloj. Maŭritano fine retiriĝis de Saharo ag-

noskante al la Sahara Ŝtato.

Nuntempe la armiloj silentiĝis, Maroko kaj la saharanoj akceptis la proponon de NU organizi referendumon, sed ĉiuj sciigas ke neniu akceptus kontraŭan rezulton. La tempo ludas favore al Maroko. Sed la ekzisto de la Sahara Respubliko estas realaĵo, malgraŭ la okupo de granda parto de sia teritorio, ĝi estas agnoskita de 51 ŝtatoj de la tuta mondo. Hispanio, post la demokratiigo, rilatis simpatie al *Frente Polisario*, sed oni decidis la fermon de la oficejoj en Madrido kaj en Kanarioj kiam la gerilanoj pafis al hispana milit-ŝipo mortigante soldaton, la *Frente Polisario* rapide pardon-petis argumentante ke li konfuzis la hispanan ŝipon kun alia maroka.

La problemo de la malkolonigo de Saharo ankoraŭ oni ne solvis, ĝi estas unu el la plej nigraj pagoj de la hispana historio.

J. M. R. H.

Notoj:

- (1) En 1975 estis mortpafitaj kelkaj membroj de la teroristaj organizoj ETA kaj FRAP.
- (2) *res nullius* = nenies aĵo, en Internacia Juro oni konsideras tiel la teritorion ne antaŭe okupita.
- (3) Partido de Unión Nacional Saharaui = Partio de la Unuiĝo Nacia Sahara.
- (4) Frente Polisario = Frente Popular de Liberación de Saguia El-Hamra y Wadi Dahab (Rio de Oro) = Popola Fronto por la Liberigo de Saguia El-Hamra kaj Riodeoro.

ANDALUZIA
POEZIO

... Kaj mi foriros. Kaj restos la birdoj kantante.
kaj restos mia korto kun sia verda arbo
kaj kun sia putto blanka.

Ĉiuvespere la ĉielo estos blua kaj pala,
kaj sonoros, kiel ĉi-vespere sonorantas,
la sonoriletoj de la tifaŭ.

Forpasos tiuj kiuj min amis
kaj la vilaĝo renoviĝos ĉiujare;
kaj fore de la svarmo neta, surda, stranga
de la fermita dimanĉo,
de la veturilo je la kvina, de la boatoj en la banejo,
en la kaŝita angulo de mia korto blanka,
inter la floro, mia spirito vagos silente.

Kaj mi foriros, estante alia sen hejmo, sen arbo
verda, sen putto blanka,
sen ĉielo blua kaj pala ...
Kaj restos nur la birdoj kantante.

* * * * *

Inteligenteco, donu al mi
la certan nomon de la aĵoj!
... Estu mia vorto
la aĵo mem
nove kreata de mia animo.
Iru tra mi ĉiuj,
kiuj ilin ne konas, al la aĵoj;
Iru tra mi ĉiuj,
kiuj jam ilin forgesis, al la aĵoj;
Iru tra mi ĉiuj,
kiuj ilin amas, al la aĵoj ...
Inteligenteco, donu al mi
la certan nomon, kaj vian,
kaj sian, kaj mian, de la aĵoj!

Juan Ramón JIMENEZ

Moguer (Huelva) 1891 - San Juan (Puerto Rico) 1958
Nobel-premiita en 1956

$$E = mc^2$$

*

SCIENCA PAGO

La AERO-SAKO estas kune kun la brems-sistemo ABS unu el la plej nova invento rilate la sekurecon de la aŭtomobiloj; tamen ĉi elpen saĝo ne estas tiel nova, jam en 1970 la usona trafik-departemento leĝe devigis la uzadon de la aero sako en ĉiuj novaj veturiloj, tamen la praktika ne-ebleco instaligi prokrastigis la aferon. Sed oni antaŭvidas sian kompletan uzadon en usonaj veturiloj por 1995.

Kio estas la AERO-SAKO?

Baze, temas pri sako kiu en la momento ekzisti kolizio pleniĝas je gaso en 30 milisekundoj, intermetante ĝin inter la stiranto kaj la fronta parto de sia veturilo. Ekzistas ankaŭ modeloj ne nur por la stiranto sed ankaŭ por la akompananto. Tiel oni evitas la kolizion pro la inerteco de la korpoj.

Kiel ĝi funkcias?

Temas pri plastika sako faldita ene de la stirilo kiu tuj pleniĝas je gaso. Ĉi gaso troviĝas en botelo apud la sako, kaj ĝi ekfunkcias pro elektra ilo kiu detektas la akcidenton kiam ekzistas abrupta malakcelo. En Eŭropo la entreprenoj kiu studas la praktikan aplikon de la aero-sako estas Mercedes, Volvo kaj Electrolux.

Kelkaj Statistikoj

La fronta kolizio estas sendube la plej danĝera aŭtomobil-akcidento. En Hispanio dum la jaro 1990 estis 12.487 mort-akcidentoj pro ĉi kaŭzo. Laŭ studoj de la entre-

preno Mercedes la uzado de la aero-sako savus la viktimojn en la 80% de la akcidentoj. Kiel en Eŭropo la 60% de la akcidentoj ŝuldiĝas al la frontaj kolizioj oni povus eviti dank'al la aero-sako la 50% de la mortoj de la aŭto-vojoj.

Kaj en Hispanio?

Hispanio ankoraŭ decidis nenion pri ĉi nova sistemo. Kelkaj aŭtomobil-entreprenoj ofertas ĝin, sed ĝenerale temas pri la plej multekostaj modeloj de firmaoj ne-popularaj. Por Citroën la instalado de ĉi sistemo estas tre multekosta kaj ankoraŭ estas alt-preza por la aŭtomobiloj pli popularaj. Tamen kelkaj aŭtomobil-entreprenoj ofertas ĝin pliigante la koston proksimume 250.000 ptojn.



Por tiuj kiuj ĉi-somero uzos la aŭtomobilojn por vojaĝi memoru ke la inform-telefono de la Trafika Stata Departamento estas

900-123-505

LA TRIA SEKRETO

Ekde kiam Lucia, tiu paŝtistinetino de Cova de Iria en Portugalio donis la koverton al Lia Sankta Moŝto en Romo, neniu, escepte de liaj kaj la venontaj Papoj, konis laŭvorte la enhavon. La estraro de mia ĵurnalo sendis min al la Eterna Urbo por koni ion pri la nova Papo, kaj se tio estus ebla ankaŭ pri la enhavo de la mistera koverto. Naivuloj ! Ili kredas ke la tria sekreto de Fatima egalas al ia informo pri politiko aŭ ekonomio, ne ĉio oni povas atingi kontraŭ mono. Tamen la afero tuj interesis min, kaj kiam mi unuafoje, kaj iom abrupte mi konfesas, havis la ŝancon meti mikrofonon tuj apud sia vizaĝo, okaze de multpersona akceptado, mi demandis rekte kaj kuraĝe "Ĉu vi povus diri min pri kio temas la tria sekreto de Fatima, ĵus konita de Ĉi?", "Kiel?" Li respondis, miksigante la italan vorton kun sia norda parolmaniero. "Jes! Kion alportos al la mondo la tria sekreto de Fatima? Mi redemandis Ĉu ĝi estos tiel katas trofa kiel oni asertas? Ĉi dua-fojo li komprenis min perfekte, tiam li min ridetis mal dolĉe, metis sian dekstran manon sur mian kapon kaj mi sentis la oran malvarmecon de sia ringo kiam li krucsignigis sur mia frunto.

Mi ne estas katoliko, eĉ ne kris-
tano, sed per tiu krucoŝigno mi sentis ion, mi
ne scias, ekde tiam mi estas iom malfeliĉa,
ĉu okazos estontece? Ĉu la tria kaj defi-
nitiva mond-milito? Ĉu la islamanoj invados
la okcidentan mondon? Aŭ simple la dia kole-
ro realiĝos pere de tertremoj kaj uraganoj?



Mi memoras mian infan-aĝon tie, en la malvarma seminario, kiam iu parolis min pri Fatima, komence mi pensis ke ŝi temis pri nova supozita prezentigo de la Madono, tamen tiu olda pastro diris min ke unu el la vidantoj ankoraŭ vivis, tio kŭrizigis min. Ĉu mi povus paroli iufoje kun ŝi? Oni diris min ke ŝi nomiĝis Lucia, kaj ke kune kun Jacinta kaj Francisco vidis la Virgulinon multajn fojojn, sed nur Lucia vivis. Onidire la Madono komunikis al Lucia tri sekretojn.

Unue Jacinta kaj Francisco mortus depost malmulte da tempo, kio efektive okazis; due, oni parolis pri la kristaniĝo de la atea kaj kontraŭkristana Ruslando; kaj laŭdire la tria sekreto estis tiel terura ke Lucía ne kuraĝis komuniki ĝin al la Homaro kaj preferis informi pri ĝi rekte al la Papo. Iutage mi havis la ŝancon koni persone al Lucía, okazis tio antaŭ kelke da jaroj kiam mi vizitis Portugalion por ĉeesti konferencon kune kun aliaj kardinaloj, sed fine mi ne sukcesis viziti ŝin ĉar la episkopo ne permesis tion al mi.

Kelkaj jaroj poste la afero intrigis min, kion povus alporti al la Homaro la estonteco? La respondo tiam ŝajnis okulfrapa, sendube la trian mond-militon, la nukleaj armiloj, la bombo-H kaj la definitiva milito dronigus la Homaron, kaj se Dio ne solvis ĝin, ĉio finiĝus baldaŭ. Tamen post kelkaj jardekoj ĉio ŝanĝiĝis, ŝajnis ke la Paco regus sur la mondo kaj ke la dua sekreto sendube realiĝis.

Mia vivo sekvis strangan vojon, la episkopoj de mia lando elektis min kiel reprezentanton ĉe la Vatikano, poste la Papo mem res--pondecis min pri kelkaj gravaj aferoj kaj tiel mia rolo ĉe la Sankta Si--dejo estis ne-anstataŭigebla. Post kelke da tempo forpasis sankte la Papo, kaj unu monato poste la kardinaloj elektis min kiel nova posteu--lon de Petro. La dua tago, jam kiel Papo, mi memoris pri la tria sekre--to, tiu kiun la Papoj aŭde gardis ie. Tiam mi demandis la ĉefpresbite--ron kie kuŝis la koverto. Silente li kondukis min al antikva salono, tie ene de ŝranko, inter kelkaj libroj, mi trovis ĝin. Mi restis sola en la ĉambro, mi rompis la sigelon, apertis la koverton kaj legis la en--havon.

Nur du frazoj, nur kvar vortoj. Tie estis skribita ĉio, la tu--ta homara historio, nia pasinteco kaj la nuntempo, kvar vortoj kiuj de--terminis nian ne-certan estontecon, verŝajne en tiu momento la Homaro plenaĝiĝis. Tamen mi agis kiel ektimigita infano kaj mi gardis la kover--ton. Eble post kelkaj jaroj nova posteulo de Petro, post mi, malfermi--gos ĝin, kaj ili agos laŭkonscience. Sed mi, komprenante tiam ke mi es--tis nur homo, ne kuraĝis paroli iun pri tio.


Hodiaŭ, multaj jaroj poste, ĉiu-nokte mia menso ripetas tiujn du frazojn, marteladas min tiuj kvar vortoj: "*Nietzsche pravis, Dio mor--tis*".

J. M.

Jen nova rubriko de nia revuo. Ni publikigos la novelojn, mallongaj ro--manetoj, kiujn vi sendos al ni. Ili devos esti verkataj en Esperanto pri kiu ajn temo kaj ne antaŭe publikitaj. Bv. sendi viajn skribaĵojn al ni, se ĉi rubriko sukcesas ni pripensos eĉ la eblecon premi la plej bonajn novelojn. Nia adreso: GAZETO ANDALUZIA. Poŝtkesto 611. CORDOBA.-

 * LUDU KUN NI *

I .- Kiom da trianguloj vi observas en la jena figuro?



II .- KULTURA TESTO.

Ĉu vi kuraĝas respondi la jenajn demandojn? Ni helpos vin per 4 eblaj respondoj, nur unu estas korekta.

- 1.- Luando estas afrika ĉefurbo, sed en kiu lando vi ĝin trovos?
 a) Bocvano b) Mozambiko c) Angolo d) Zairio
- 2.- Super Hiroŝimo oni lanĉis la unuan atom-bombon, sed kiam ekzakte?
 a) 16an-Jul-'45 b) 26an-Aŭg-'45 c) 6an-Sept-'45 d) 6an-Aŭg-'45
- 3.- Rigardu Hispanion sur landkarto, kiu lando troviĝas antipode?
 a) Nov-Zelando b) Aŭstralio c) Novgvineo-Papuo d) Filipinoj
- 4.- Nun pri hemio, ĉu vi scias kiom da hemiaj elementoj ekzistas?
 a) 100 b) 103 c) 105 d) 107
- 5.- Pri Esperanto-Movado, en kiu jaro okazis en Barcelono la UK?
 a) 1905 b) 1915 c) 1909 d) 1910
- 6.- Pli proksime ĉi-foje, kiu estas la ĉefurbo de Ekstremaduro?
 a) Badajoz b) Cáceres c) Mérida d) Plasencia
- 7.- La Reĝino Beatriz reĝas en eŭropa lando, sed kie?
 a) Danmarko b) Norvegio c) Nederlando d) Liĥstentejno
- 8.- Denove en Eŭropo, la koloroj de la finlanda standardo estas:
 a) ruĝa, blanka kaj blua b) blanka kaj blua c) flava kaj blua d) ruĝa kaj blanka.
- 9.- Pri Historio, kiu estis la unua prezidanto de la Dua Hispana Respubliko?
 a) Azaña b) Alcalá Zamora c) Lerroux d) Casares
- 10.- La enfluejo de Arosa troviĝas en Galegio, sed en kiu provinco?
 a) A Coruña b) Lugo c) Ourense d) Pontevedra

III.- REBUSO

MADRIDO : KVADRATO
BERLINO : STATO
LONDONO : MANDATO
ROMO : PONTO

Pri kio temis la prelego ?
Pri ...

IV.- LITERSUPO

V	O	L	A	P	U	K	F	G	R	S	B
T	H	K	I	S	B	J	C	O	A	P	O
J	V	E	N	R	C	Z	V	I	A	C	L
M	L	A	T	N	E	D	C	C	O	N	L
T	F	E	S	V	G	N	R	M	S	A	
J	N	P	R	A	O	A	U	S	E	M	C
L	A	B	L	E	I	B	A	O	E	F	B
V	M	F	O	D	P	L	O	L	R	L	F
I	L	E	N	M	A	N	O	V	I	A	L
K	F	E	G	C	S	P	R	K	E	M	I
T	S	M	U	M	A	K	L	A	J	V	T
O	T	N	A	R	E	P	S	E	K	F	A

Trovu la nomon de 9
Internaciaj Lingvoj.

Se vi atingas diveni la solvojn de ĉiuj ludaĵoj sendu al ni leteron. Jen nia adreso: GAZETO ANDALUZIA Apdo.611 14080 CORDOBA. Inter la solvantoj ni lotos kasedon de la roka ensemblo AMPLIFIKI.

La solvoj al ĉi-paĝaj ludaĵoj aperos en la unua numero de la jaro 1992. Atentu la solvoj de la krucvortenigoj de la du lastaj numeroj, 25a kaj 26a, aperos en la venonta numero.

E I S L A !

